Bolanta Kaldrono

INFORMILO *269 de la*
Esperanto - Grupo Bremen
Marto - Majo 2004

Sekr: D-ro Hans Walter Krüger, Dordrechter Str 36, 28259 Bremen, Tel: 0421 561943
Informoj: Prezidanto OstR Hellmut Grebe, Tel: 0421 3963480
Kasistino: Ruth Bohn, Tel: 0421 382715
Red: Dieter Hartig, A.-Hagedorn-Allee 55, 28279 Bremen, Tel: 8476806

Vizitu nin en interreto: www.esperanto.de/bremen

Dort präsentieren wir unser aktuelles Programm, unsere Zeitung Informilo, die Geschichte unserer Esperanto Vereinigung und die Bremer Stadtmusikanten in Esperanto

Kiu bridas siajn dezirojn, estas ĉiam sufiĉe riĉa.

(Wer seine Wünsche zähmt, ist immer genug reich)
diris Voltaire

Nia programo en 2004

Ni preparu la 100-jarigon de nia Esperanto-Grupo.
Nia grupo estis fondita en Decembro 1906.
(1910 vizitis nin D-ro Zamenhof)

Ĉiam je la 20a horo en nia kunvenejo Brodelpott

La 03an de marto : **Vojaĝo trans Estonio**
Hellmut Grebe lumbildprelegos pri sia interesa vojaĝo.

La 07an de aprilo : **El juda Literaturo**
Dieter Hartig meditas kaj rakontas pri tiu interesa temo.

La 20an de Majo: **Maja Ekskurso al la kastelo en Hagen**
Detalajn informojn vi ricevos ĝustatempe.

La 09an de Junio: **Familia vojaĝo tra Usono**
Familio Kruse entreprenis aventuran vojaĝon.

La 07an de Julio: **Ĝardenfesto**

En Aŭgusto **Ni feriu !!**

La 08an de Septembro : **Diskutoj pri aktualaĵoj**
Aranĝita kaj gvidita de Kurt Meyer.

La 13an de Oktobro:

La 10an de Novembro

La 08an de Decembro: **Zamenhoffesto**
Invitas Familio Kruse en Lemwerder

Retrospegulo

Trajnveturo en la jaro 2100

Grupvespero okazinta la 11an de junio 2003.
10 personoj ĉeestis, kiujn Bodo Ehrlich regalis per frandaĵoj kaj ŝaŭmvino okaze de sia 45-a naskiĝtago. Priparolinte inviton de la Esperanto-Grupo Groningen Dieter Hartig kaj Bodo Ehrlich raportis pri la IFEF-Kongreso en Dresden. Ruth Bohn laŭtlegis parton de letero el Bona Espero.
La ĉefa parto de nia grupvespero konsistis el prelego, kiun Dieter Hartig faris: Li prezentis al ni vizion pri transatlantika trafiko en la jaro 2100.
Ĉu realiĝonta utopio, ke trajnvojaĝo de Londono al Nov Jorko nur daŭros 2 horojn? Antaŭ 200 jaroj ankoraŭ estis neimageble vojaĝi ĉirkaŭ la mondo en nur 80 tagoj! Kaj intertempe? Aviadiloj sukcesas traflugi tiun distancon preskaŭ en unu tago!

Jam nun ekzistas la ebleco sendi poŝtaĵojn en ege mallonga tempo de unu loko al alia pere de tuboj. Kial la inĝenieroj ne eluzu tiun sistemon por la transporto de personoj?
Dieter Hartig detale priskribis, kiamaniere persono en la jaro 2100 povus sperti (kaj ĝui) sian transportiĝon komfortan kaj preskaŭ senbruan. La bezonata energio efikos per premo aŭ vakuo en la tubo. Ne ekzistas aer-rezisto; do, energio ne perdiĝos, kaj pro tio la kostoj estos tre malaltaj. Nur la tuboj kostas! Ĉu ili estos sekuraj ankaŭ kontraŭ la fortoj de la maro kaj de tertremo? Ĉu ili estas sekuraj ankaŭ ĉe eventualaj atakoj de teroristoj? La estonto montros, kio estos efektivigebla.

Hellmut Grebe

Feliĉa kunveno en Oldenburg

S-ino Elfriede Coburger invitis al la intertempe tradicia kunveno. Denove estis la reago atendite granda. El la tuta norda regiono venis esperantistoj por travivi agrablajn horojn. Ĉiu kunprenis ion, ĉu torton. kukon, aŭ alian frandajonl. Estis tre apetitveka aspekto sur la granda tablo.
Elfriede Coburger afable bonvenigis siajn gastojn esprimante la ĝojon pri la abunda akzepto de la invito. La gastoj ofte ŝanĝis dum la vespero la lokojn por alterne babili kun diversaj ĉeestantoj. La duonlauta murmuro konvinkis, ke ĉiu trovis sian konversacianton.
Vespere, jam estis ekstere malhela, la gastoj adiauis kaj dankis pri tiu feliĉa, agrabla kunveno. Dankon, kara Elfriede.

Hg

Grupvespero la 12an de novembro 2003 **Lingvaj studoj**
Evidente temis pri gramatiko de Esperanto, kvankam laŭdire tre facile lernebla, ŝajnas esti la gramatiko danĝera afero. Nur tri gemembroj riskis kunveni en nia Brodelpott.
Por gramatikaj studadoj mi rekomendas surprizatakojn; neanoncite dum kunveno.

Hg

La 3an de decembro. **Zamenhoffesto ĉe familio Krüger**
Ĉijare ni festis nian Zamenhoffeston en la hejmo de familio Krüger. Elke kaj Hans-Walter zorgeme ĉion bone kaj feste aranĝis, la salono estis belete ornamita, sed tamen, la plej granda ĝojo por la ĉeestantoj estis la ĉarmaj ĝemeloj Cornelia kaj Carola, la du kaj duon jaraj etuloj. Ili prezentis la plej viglan vivon kaj kore plezurigis nin. Ili estis donitaj laŭvice al ĉiuj gastoj.
Estis tre agrabla kunveno, ni kantis kaj festis en bela etoso dum niaj gegastigantoj afable regalis nin per frandaĵoj kaj trinkaĵoj.
Sincere ni dankis al Elke kaj Hans-Walter pri tio bela aranĝo de nia ĉijara Zamenhoffesto

Hg

La 7an de januaro **Ni bonvenigas la Novan Jaron**

Nia grupo komencis la novan jaron per inda aranĝo, en kiu partoprenis entute 14 personoj: Anatoli Ionesov estis nia gasto kaj prelegis pri Uzbekio kaj donis al ni impreson pri la riĉa kulturo de tiu lando precipe en la ĉefurbo Samarkand. Ni ĝuis, ke la preleganto uzis Esperanton kvazaŭ gepatra lingvo kaj pruvis per tio, ke internacia interkompreniĝo povus / povas ja esti memkomprenebla afero.
Ni eksciis multon pri la historio, ĉar Samarkand estis ligilo inter la grek-romiana kaj la orienta kulturoj, komerca centro sur la silkvojo. La islama religio tie estigis mirindan arkitekturon, murojn kaj kupolojn, kiuj havas belan aspekton pro la glazuritaj brikoj kaj tegoloj, La uzbeka ŝtato klopodas konservi la konstruaĵojn kaj jam renovigis grandan parton.

Ni povis vidi ankaŭ kelkajn bildojn el la "Muzeo de Paco kaj Soliaro", kiun Anatoli gvidas en Sanarkand.
Bedaŭrinde ni ne povis vidi ĉiujn bildojn, ĉar ni ne povis funkciigi la aparaton por la bild-disko.
Fine Anatoli aŭdigis kanton dediĉitan al la komencantoj de la lingvo internacia.
Ni kore dankas al Anatoli pro tiu eksterordinara grupvespero.
Private mi havis la plezuron kunesti kaj babili kun li longe: Ni komune vizitis la "Universon" en Bremen, faris ekskurson al Fischerhude kaj rondiris tra la urbocentro de Bremen.

Hellmut Grebe

La fremdulo

Josette Ducloyer
El "Esperanto Fervojisto". Periodaĵo de Franca Fervojista Esperanto-Asocio

Via Kristo estas juda
Via aŭto estas japana
Via spico estas itala
Kaj via kuskuso estas alĝeria.
Via demokratio estas greka,
Via kafo estas brazila,
Via horloĝo estas svisa
Kaj via ĉemizo estas indiana

Via radio estas korea,
Via ferioj estas turkaj,
tunizaj aŭ marokaj,
Viaj ciferoj estas arabaj,
Via skribo estas latina.

Kaj . . . vi riproĉas al via najbaro,
ke li estas fremdulo !

Leksikologio **El malnovaj vortaroj. Difinoj kaj meditaĵoj**

(Brokhaus Conversations – Lexikon 1850) **Sub „kontenteco" (Zufriedenheit)**

Difino:
Kontenteco estas kutime konstanta animstato, per kiu la homo akceptas sian sorton kaj rilatojn kompare kun siaj deziroj. Gaja temperamento kaj la kutimo, serĉi la bonajn flankojn, subtenas la kontentecon. Sed la ĉefa trajto estas, redukti siajn dezirojn, direkti siajn klopodojn al nepereemaj aĵoj kaj nepre fidi al la providenco. (Vorsehung)
Meditado:
Enketoj eltrovis, ke la nombro da feliĉaj kaj kontentaj homoj restis en la lastaj 50 jaroj konstante inter 25 ĝis 30%. Tiu fiksa kerno da feliĉuloj kaj kontentuloj estas per nenia merkata artifiko pligrandebla.
La samaj enketoj atestas, ke la nombro da duone feliĉaj kaj kontentaj uloj konstante kreskas, Ĉu tio signifas, ke la nombro da malfeliĉuloj konstante malkreskas?
Tiru mem la konkludon, kara leganto.

(Brokhaus Real.Encyklopedie 1874) **Sub "ruladoj" (Rouladen)**

Difino:
Ruladojn oni nomas rapidajn sinsekvojn de sonoj (Läufe), per kiuj estas melodioj ornamitaj. Ili postulas muzikaĵojn kun vigla movo en kiu tamen troigo estas evitenda.
Flanke de artisto ili postulas persistemon.
Meditado:
La sekvo de troigo ĉe rulado montriĝas plej malfrue post la rostado, kiam la rostfadeno ne povis teni, kion la kuiristo enpremis.
Kiu estas post opero-aŭskultado tute elĉerpita, povas tion atributi al superŝarĝo de siaj timpanaj membranoj (Trommelfelle).

Dieter Hartig